


5. Mondo estas sen valoro

(Am-poemo al Maria)



1. Mon-do es - tas sen va - lo - ro
2. Ho vi, ĝoj' de l' kor' ĉa - gre - na,
sen vi, mi - a be - la flo - ro,
vi, so - pi - ro dol - ĉo - ple - na,
jen vi sta - ras nun ĉe l' ko - ro:
vi, fe - li - ĉo plej se - re - na,
Gra - co - ple - na! Ho tre - zo - ro!
sur vi Di - a ma - no be - na.

3. Brila or-palaco mia,
bon-odora flor' lilia,
rozo ruĝa, rozo Dia,
Virgulino! Ho Maria!

4. Ame flamas mia sino,
vin sopiras mi sen fino.
Mia amo kaj animo!
Vin salutas mi, Reĝino!

MONDO ESTAS SEN VALORO • kontrafakturo de profana am-kanto • M kaj E-adapto: Albrecht Kronenberger 2004 • hungara T: Bálint Balassi (1554-1594) • E (Renkontinte Julian, jene [li] ŝin salutis): Kálmán Kalocsay (1891-1976) • el: Floroj el la ĝardeno de la Hungara Literaturo, 52-a KELI-Kongreso, Bereksfürdő, Hungario, 2002